

Numero: 297.
Februaro 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Fulmrapida lingvolernado

Retumante mi ofte vidas reklamojn pri fulmrapidaj lingvolernadoj. Oni proponas al la legantoj eksterordinarajn metodojn. La reklamo garantias al mi, ke mi povos ellerni la elaktitan lingvon aŭ lingvojn dum kelkaj semajnoj.

Vere estus bonege, se ekzistus tia metodo. Sed ankoraŭ mi ne renkontis tian homon, kiu ellernis iun lingvon dum kelkaj semajnoj aŭ monatoj.

Mi ne kuraĝus aserti, ke ankaŭ Esperanto estas ellernebla dum tiom da tempo.

Ankaŭ ni geesperantistoj faras stultaĵon, kiam ni fanfaronas, oni povas ellerni Esperanton fulmrapide.

Laŭ mi ekzistas talentuloj, kiuj lernas lingvojn rapide. Onidire N. Ny. Tolsztoj ellernis la zamenhofan lingvon dum tri semajnoj. Mi ne scias kiomgrade li sukcesis ellerni ĝin. Eble li ellernis nur la gramatikon. La gramatiko de Esperanto estas simpla. Ĝin oni povas lerni dum kelkaj semajnoj, sed tio ĉi ankoraŭ ne estas la plena lingvo. Nur per la scio de ĝia gramatiko, oni ne povas komuniki. Multaj aliaj aferoj estas ankoraŭ bezonata.

Antaŭ jaroj en la televido mi vidis raporton pri alia fulmrapida lingvolernado. Oni anoncis ĉi tiun grandiozan metodon, ke oni povas lerni la lingvon dormante. Ĝia nomo estis RELAXA – metodo. Certe multaj legantoj renkontis ĝin sur la stratoj kaj placoj.

Post dusmajna lingvolernado la raportisto paroligis la kandidataton por pruvi, kiom li/ŝi sukcesis alproprigi la lingvon.

Fakte la lernanto sciis kelkajn gravajn esprimojn, vortojn. Li sciis prezenti sin aŭ peti glason da akvo. Sed ĝi ankoraŭ ne estis brila komunikado, kiam oni povas paroli senĝene kun eksterlandano, ŝanĝi ideojn.

Fine la raportisto rimarkis: por ke la lernantoj scii la lingvon estas necesa lerni plu. Ĉu monatojn, jarojn? Mi ne scias.

Mi estas konvinkiginta, perfekte ellerni iun lingvon oni bezonas multe da laboro.

Ankaŭ Esperanto ne estas escepto.

— Redaktanto —

La plendo de museto

— Ĥo, la Dio de ĉiuj musoj, se mi scius la lingvon de la kato! Mi estus la plej feliĉa besto en la tuta mondo. Bedaŭrinde mi ne ellernis la katolingvon kaj pro tio la kato koleras je mi. Ĝi pelas min dum la tuta tago. Mi ne havas tagon gajan eĉ nokton. Mi devas tremi ĉiam. Tiu kato kaŝrigardas min en la nutraĵkamero kaj ne pardonas.

Se almenaŭ mi povintus diri al ĝi, ke ni fariĝu amikoj. Certe ĝi aŭskultus mian peton kaj ne ĉaŝus min.

Kion mi faru, ke ĝi komprenu malfeliĉan museton, kies unusola kulpo, ĝi ne scias la katolingvon.

Kiu povus helpi al mi? Mi volonte lernus ĉi tiun mondlingvon. Laŭ mi la plej bona lingvo estas la ĝia. Ĉiu parolas ĝin sur la tuta terglobo. Ankaŭ ni musoj devus ellerni ĉi tiun grandiozan, disvastiĝintan lingvon.

Se ni musoj scius katolingve, tiam inter la musoj kaj katoj estus eterna paco. La malamikeco estas pro la lingvaj miskomprenoj. La katoj ne komprenas nian sinceran proksimiĝon al ili. Ja, ankaŭ ni havas kvar piedojn. Vere ni estas malgrandaj, sed tio ĉi ne signifas, ke ni ne deziras pacon.

Sufiĉe granda estas la nutraĵkamero. En ĝi estas nutraĵo por katoj kaj musoj. La katoj ne devus servi la homon, kiel la sklavoj, por ke ili ricevu iom da lakto.

En la nutraĵkamero estas kolbaso, ŝinko, fromaĝo kaj multaj aliaj bongustaĵoj, kiujn ĉiu kato ege ŝatas. Ni musoj ne manĝos ĉion. Ni volonte lasos manĝaĵon ankaŭ por niaj aliancoj.

Sed kiel klarigi ĉi tion, se mi ne scias la katolingvon?

Mi nepre devos ellerni ĉi tiun belegan lingvon kaj pritrakti la aferon.

Jam ankaŭ hodiaŭ mi serĉos lingvoinstruiston, kiu helpos al mi en la lingvolernado. Mi certe scias, se ni havos komunan lingvon, tiam ni komprenos unu la alian.

Do, ek al la lingvolernado! Ĉiu muso lernu la katolingvon por ke realiĝu la paca kunvivado inter la katoj kaj musoj!

— Ŝaŝa —



La helpanto

La viro senmove staris ĉe la stratangulo. Li rigardis en la malproksimon. Lia vango estis nerazita kaj lia hararo estis hirta., kvazaŭ ĝi neniam estus kombita.

Ankaŭ la griza jako kaj helbrua pantolono estis trouzita.

Li aspektis vagabondo, kiu atendas la bonŝancon.

La preterirantoj rigardis al ili indifere. Vere kelkaj virinoj esprimis per siaj okuloj, ke ili abomenas tiajn ulojn. Iu virino mallaŭte rimarkis al sia kunulino.

— Kompatindulo! Fi!



(Kép forrása: internet)

Bonŝance ĉi tion la viro ne aŭdis.

Liaj pensoj promenis malproksime. Neniu scias kie. Eble en la ĉieloj, ĉar li ofte rigardis supren al la malrapide flugantaj nuboj.

Estis posttagmeze. Malfrua posttagmeze. La homoj rapidis hejmen el la laborejo. La patrinoj gvidis infanojn. Verŝajne el infanĝardeno. Malgranda knabino mire demandis sian patrino:

— Kion faras la onklo, panjo?

— Tio ne interesu vin! Rapidu, ĉar ni malfruos aŭtobuson. Via paĉjo atendas nin hejme.

Malrapide komencis vesperiĝi. Freŝa venteto trakuris inter la foliaroj de la proksimaj arboj, kiuj staris apud la vojo.

Li ne movis. Li nur staris kaj rigardis ien. Kvazaŭ ĝi estintus skulptaĵo.

Oldulino iraĉis sur la strata trapasejo portante pezan pakaĵon. Ŝi apenaŭ povis iri. La surstrata trafiklumoj jam plurfoje ŝanĝiĝis ruĝa. Kelkaj aŭtoj hupis vigligi la oldulino. Sed ŝi ne povis iri pli rapide pro la peza pakaĵo.

La viro ĵetis al ŝi rigardon. Komence li nur rigardis ŝin.

La oldulino plurfoje faligis teren la pakaĵon ĝis ŝi sukcesis atingi la alian flankon de la strato.

Alvenante ŝi, la viro ekmovis. El la skulptaĵo fariĝis karno – sango homo. Li ekiris al la direkto de la oldulino, kiu panikis, kiam li atingis ŝin.

Antaŭ ol la viro demandintus: „Ĉu mi helpu al vi, onjo?” - la oldulino ekkriegis:

— Ŝtelisto, bandito! Help’! Policisto!

— Mi ne estas ŝtelisto, kara...

La oldulino ne lasis findiri. Ŝi kriegaçis, kiel frenezulo.

— Help’! Help’! – li volas prirabi min.

La viro volis forkuri, ĉar la situacio fariĝis por li varmega. Neniu kredus lin. Oni kredus al la oldulino.

Je la kriegado ankaŭ la homoj ekstaris. Dum kelkaj sekundoj almenaŭ sep – ok homoj grupiĝis sur la strato.

Baldaŭe ankaŭ alarmanta policaŭto alvenis kaj tri policistoj saltis el ĝi kaj ili tuj ekkruelis post la viro.

Li ne sciis, kien kaŝiĝi. Ĉiu pordo kaj pordego estis ŝlosita.

Kion fari nun?

La viro ŝtoniĝis kaj malgaje atendis sian sorton. La policistoj ĉirkaŭstaris lin. La sargento diris serioze:

— Mi petas vian personan legitimilon.

— KREDU MIN! Mi nur deziris helpi al la oldulino – li diris timeme.

— La legitimilon – ripetis la policisto.

La viro nerveze komencis serĉadi en la poŝoj. La policistoj malpacience atendis kaj ili suspektis malbonon.

Fine la viro honteme elbuŝigis:

— Tion mi ne havas.

— Ĉu tion vi ne havas? – la policistoj interrigardis. — Kial?

— Ĉar mi venis el la ĉieloj.


— Li estas idioto – rimarkis iu policisto. — En la policejo ni priaŭskultos lin.

La policistoj perforte enaŭtomobiligis la viron kaj post kelkaj sekundoj forveturis.

La oldulino iomete moke diris:

— Li meritis sian sorton, ĉar li volis prirabi min.

— Johano Hézingler —



POEZIO

Esperanto havas grandan poezian literaturon originalan kaj tradukitan.

Bedaŭrinde dum la nunaj Esperanto-lingvokursoj apenaŭ oni mencias, ke ĉi tiu lingvo havas literaturon.

La celo fulmrapide ellerni la lingvon por ricevi diplomon.

Laŭ mi estas katastrofo por Esperanto. Lingvo sen literaturo estas kiel homa trunko sen la kvar membroj.

Mi proponas, kiu komencas lerni Esperanton, tiu ekkonu ankaŭ esperantistajn poetojn kaj verkistojn.

La siria knabo – Cláudio Araújo

Originala poemo en Esperanto kies nomo estas “La siria knabo”, verkita de Cláudio Araújo (2015).

LA SIRIA KNABO

Eta anĝel' ĉe l' bordo de l' mar',
Por ĉiam kuŝanta animo ĉiela,
Terure vin frapis milito kruela,
Pardonu misfaron al tuta homar'.
Suferas en mond' la homo fiera,
Pro malamikiĝo kun sia najbar',
La homoj forĝesis: ni estas fratar',
Tenebraj malamoj: vivo plej mizera.
Ĉe l' sablo silentis la lasta korbato
de l' tri-jara bebo el fora boato,
La senvivan korpon brakumas la ter'.
La ŝvito, la sango, la larmoj, dolor',
abundas nuntempe la ruĝa kolor',
en konstanta invito al la malesper'



Nokta sunhorloĝo – Alessandro Mazzolini

Originala poemo en Esperanto kies nomo estas “Nokta sunhorloĝo”, verkita de Alessandro Mazzolini.

NOKTA SUNHORLOĜO

Dormis graf' dum tempo multa,
nun pri l' horo li scivolis,
kaj al la servisto stulta
li parolis:
«Sur la sunhorloĝo doma,
Sam, rigardu do, kioma?»
«Grafa moŝto — Sam rediris —
mi ĝin vane okulumas,
ĉar la suno jam subiris
kaj mallumas».
«Ho, vi, vera bruto kampa,
Vidu ĝin ĉe lumo lampa!»



Vespere (1912) de Eska

Jam subiris hela suno,
Nokt' arbaron ĉirkaŭpremas,
De la vento arboj tremas --
Lumigitaj per la luno.
Plendas mia juna kor'
Pro sopiro kaj dolor'.
Jen arbaro forte bruas,
Lun' kaŝiĝis en nebuloj
Kaj foliojn de betuloj
Sibla vento forte skuas.
Pro sopiro kaj dolor'
Plendas mia juna kor'.



Por infanoj



La ĉapelo de la avo



Kaj estis, kaj ne estis, trans fabeloceano vivis avo. Li estis sola en sia dometo. Somero li laboradis en la ĝardeno kaj vintre li agrable pipfumis apud la varma hejtoforno.

Li havis belan, festan ĉapelon. Ĝin li surportis nur dimanĉe, kiam li iris al la proksima preĝejo.

En iu tago, kiam la avo venis hejmen la ĉapelo ekparolis:

— Mi forlasas vin, avo.

La maljunulo ekmiris kaj scivole demandis:

— Kial vi volas forlasi min?

— Ĉar mi serĉos pli junan mastron, kiu portos min al balo.

— Kion vi farus en balo?

— Tie serĉus por mi belegan ĉapeloknabinon. Mi deziras geedziĝi. Vi estas tro maljuna kaj vi portas min nur en la preĝejo.

La avo cerbumis, kion fari por ke la ĉapelo ne forlasu lin. Li ne trovis solvon por tiu ĉi grava afero. Dum la tuta nokto li turniĝadis en la lito sendorme. Matene li estis tre laca. Apenaŭ li povis ellitiĝi.

Elirinte el la domo lia hundo tuj rimarkis:

— Avo vi estas tre laca kaj malgaja. Kio okazis al vi?

Li detale rakontis ĉion. Fine lia hundo laŭte ekridis:

— Ni devos puni la ĉapelon. Mi proponas al vi, lasu la ĉapelon en la verando kelkajn horojn.

La avo ne komprenis, kion elpensis la hundo. Malgraŭ tio li faris ĉion tiel, kiel ĝi estis proponita.

— Kien vi portas min? — demandis la ĉapelo, kiam lunde la avo prenis ĝin.

— Hieraŭ vi diris, ke vi volas forlasi min. Mi pensis, mi helpas al vi — respondis la maljunulo.

Tio ĉi tre plaĉis al la ĉapelo kaj ĝi ĝojegis.

En la verando la ĉapelo estis metita sur la tian tablon. La hundo atentis ĝin. Kiam la avo reiris en la domon ĝi eksaltis kaj per ĝiaj akraj dentoj prenis la ĉapelon.

— Kion vi faras? Kiel vi prenis min per viaj dentoj tio dolorigas min — lamentis la ĉapelo.

— Mi aŭdis, ke vi volas forlasi la avon — diris ruze la hundo — Mi pensis, se vi konsentas mi portos vin al la nova mastro.



— Bone, bone, sed ne tiel dolorige per viaj dentoj. Almenaŭ permesu al mi, ke mi sidiĝu sur vian dorson.

— Tio estas neebla. Mi kuras tro rapidege kaj vi falus en la koton. Kiel trovi belan ĉapeloknabonon malpure.

— Sed tiel viaj akraj dentoj vundos min. Jam ankaŭ nun ĉi tiu vojaĝo estas tre doloriga. Mi ne volas veturi per vi. Bonvolu remeti sur la tablon!

— Ne eble. Mi promesis al avo, ke mi helpos al vi. Ni ekiru! Kien vi deziras iri? — demandis la hundo kaj ĝi denove forte ekmordis la ĉapelon.

— Ve, ĝi dolorigas min! Ne mordu tiel forte!


La hundo ne obeis. Fine la ĉapelo komencis kriegadi:

— Avo, help'! Tiu ĉi damnita hundo dismordadas min. Help'!

Kuris la avo, kiel li povis kaj li liberigis sian ĉapelon el la buŝego de la hundo.

La ĉapelo estis tre dankema kaj plurfoje ĝi ne volis forlasi la maljunulon.

— Onklo Adalberto —



Ni ridu!

Telefonludo

La telefono de viro eksonas:

- Sinjoro vi gajnis centmil eŭrojn, se je ĉio vi respondos per neo. Ĉu vi estas preta?
- Jes

— o —



— o —

Plendas la edzo

- Sinjoro doktoro, mi havas gravan problemon. Mia edzino kondukas infanece.
- Bonvolu diri la simptomojn! Diru almenaŭ unu ekzemplon!
- Kiam mi banas min en la bankuvo, ŝi envenas kaj ŝi subakviĝas miajn paperŝipetojn.

— o —



- Mi vidis mian paĉjon kun panjo en la lito. Laŭ mi li ŝtelas mian lakton.

Vintre la infanoj faras neĝhomon. Negro ekvidas ilin kaj li diras kolere:

- Rasistoj! Ĉiam vi faras nur blankan neĝhomon. Kial ne estas nigra neĝo?

— o —



— o —

Bopatrino rigardas sin en la spegulo.

- Ho, dio mia, kiom malbela mi estas!
- Ĉi tion ekaŭdas la bofilo kaj li diras:
- Kara bopanjoo, vi ne plendu! Vi vidas vin nur tiam, se vi rigardas vin en spegulo, sed mi ĉiam.

— o —



- Tre komike!